

INFORMOJ je la 23a de decembro 2018

Nous avons reçu de :

▪ Esperanto France – Congrès franco-britannique d'espéranto 2019

En 2019, le **congrès annuel français d'espéranto** aura lieu en même temps et au même endroit que le **congrès annuel britannique d'espéranto**, du 12 au 16 avril, à **Douvres**.

Adresse : The Ark, Noah's Ark Road, Dover, Kent, CT17 0DD

Voici un aperçu du programme. Nous vous donnerons plus d'informations ultérieurement.

- Le congrès ouvrira le samedi à 9 heures, mais il sera possible de s'inscrire le vendredi 12 avril, à partir de 18 heures.
- Espéranto-France tiendra son assemblée générale le samedi. Un programme complet est également prévu pour le samedi.
- Le centre sera fermé le dimanche et la journée sera réservée aux excursions, dont deux excursions dans la région et une excursion à Calais.
- Un programme est prévu pour la journée du lundi. Le congrès sera clôturé à 17 heures.
- D'autres excursions seront proposées le mardi.



▪ Hori Jasuo – 13-a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2019

Kiel sube okazos la 13a Himalaja Renkontiĝo. Jam aligxis 14 japanoj kaj 3 germanoj, sed Nepala Esperanto-Asocio volas pli da partoprenantoj el pli da landoj, por ke g^oi estu vere internacia. Nepalo estas mirinda lando kun buntaj kulturajxoj. Cxi-foje ni grimpos sur la monton 2500 metrojn altan, de kie ni povos vidi panorame belegajn montegojn en la matena krepusko. Mi jam partoprenis preskaux cxuijn Himalajajn Renkontiĝojn, do mi bone scias mirindan landon Nepalon kaj mirindan piedvojaĝxon en la montaro. Mi invitas vin al tiu vojaĝxo. HORI Jasuo (s-ro)

Okazos la 13-a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2019

La ĉefa parto de la Himalaja Renkontiĝo 2019 estos vojaĝo al alia granda valo de Nepalo, nome Pokhara situanta okcidente 200 kilometrojn for de Katmanduo. Survoje ni haltos por vidi vidindaĵojn laŭ la riveroj Trisuli kaj Marsjagdi. De Pokhara ni povas ĝui fabelan panoramon de la montoj de Annapurna, Dhaŭlagiri kaj Manaslu (8000 metroj altaj) en la Himalaja Montaro. La pinto de Maĉapuĉre (la fiŝvosto) majeste dominas la scenon.

Laŭtaga skizo de Panchhase-Piedvojaĝo:

- la 26an de februaro: Alveno, enhoteliĝo kaj bonvenigo
- la 27an de februaro: Vidindaĵoj en Katmanduo
- la 28an de februaro: Vidindaĵoj en Katmanduo
- la 1an de marto: 6-hora veturado de Katmanduo al Pokhara (820m)
- la 2an : 4-hora marŝado de Pokhara al Pumdi (1520m)
- la 3an : 5-hora marŝado de Pumdi al Panchhase Vanjang (2500m)
- la 4an: 6-hora marŝado de Panchhase al Bhadaure (1670m)
- la 5an: 6-hora marŝado de Bhadaure al Naudada (1515m)
- la 6an: 6-hora marŝado de Naudada al Pokhara
- la 7an: Reveno de Pokhara al Katmanduo

la 8an: Libera tago kaj Adiaŭa Vespero
la 9an de marto: Foriro

Se vi havos intereson pri la Renkontiĝo, kontaktu:

Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O Box: 10518 Kathmandu, Nepal.

Telefono:00977-9841273761 Retadreso: nespa.1990@gmail.com Retejo : www.esperanto.org.np

▪ Pectine Nonuke

La revue de presse du 1er au 15 décembre 2018 est à présent en ligne sur mon blog.

Cordialement. Pectine <http://pectineactualites.wordpress.com/>

Ou par le site "Les Veilleurs de Fukushima" : <http://lesveilleursdefukushima.blogspot.com/>

▪ Espéranto Hamilton

Verŝajne malmultaj legis pri la unika evento en la nuntempa historio. Temas pri batalhalto okazinta komence de la 1-a mondmilito. Ĝi montras, ke neniu normalaj homoj (ankaŭ soldatoj) volas memvole mortigi nek esti mortigitaj: ĉu en Eŭropo dum la mondmilitoj, ĉu nuntempe en Sirio, Irako, Burundio aŭ Niĝerio. Vere instrua kaj pozitiva pruvo. Kiu provos tadi ĉi tiun artikolon al aliaj lingvoj? Ni ne havis tempon por tio. Kion ni povis, ni faris: kelkaj artikoloj aperas ankaŭ en naciaj lingvoj (angla, franca, germana kaj hispana) – pretaj por publikado! Ĉiukaze, oni povas ilin plu dissendadi al multaj ret-korespondantoj kaj tiam bonvolu nepre mencii, ke tio estas tradukita el Internacia Lingvo Esperanto.

Inter pli optimistaj artikoloj, vi trovos – kiel kutime – la ĉapitrojn de "La Torĉo" kaj "Nia Vilaĝo" (i.a. pri kapsiko – bona ne nur en kuirejo sed ankaŭ por sano). Dum jaroj, listo de utilaj plantoj fariĝis jam sufiĉe longa kaj eble ĝi aperos en iu numero. Ĝojan Kristnaskon al tiuj ĝin celebrantaj kaj – al ĉiuj – "Feliĉan Novjaron!".

Amike via, NU red.

▪ Alain Runel – Espéranto Lozère

Vi ofte spertis, kiel malfacile estas allogi kaj interesi niajn neesperantistajn samurbanojn aŭ samlandanojn. La ĉefa problemo estas rapide kaj sendube evidenti la efikecon de la internacia lingvo, kio postulas partoprenon de eksterlandanoj. Fakte se nur ĉeestas samlingvanoj, la aranĝo aspektas iom artefarite kaj ni penas konvinki, sen paroli pri varbi. Jen trafa okazo... Venontan jaron, en junio, grupo da polaj Esperantistoj (el Vroclavo, Malsupra Silezio) turneos tra Francio. Ne temas pri banala turismo sed grava okazo por aperi Esperanton en publikaj lokoj. Ĉiuj estas artistoj : muzikistoj, dancistoj, kantistoj... Aliaj kreas artaĵojn per manlaboro kaj gvidas "atelierojn" (laborsesiojn). Pli da detaloj kaj la programon de prezentotaj aktivaĵoj vi trovos en la alkroĉita dosiero. Ni serĉas salonojn aŭ ĉiajn ejojn por organizi tiun valoran spektaklon kaj gastigantojn por niaj vizitantoj. Nun certas ni pri unu haltejo, en la urbo Alès (norde de Nîmes) la 8an de junio. Tie bonŝance kunordigos la aranĝon la surloka pola asocio "Cévennes-Pologne". Antaŭe aŭ poste eblos plani aliajn etapojn, se vi interesiĝas pri tia agrable kultura aranĝo. Mi emfazu la STRATEGIAN intereson de tiu afero: gravas aŭdigi kaj vidigi VIVAN Esperanton se ni vere intencas diskonigi, disvolvi, kreskigi la internacian lingvon. Tiaj iniciatoj ege superas ĉiajn kutimajn surlokajn aranĝojn, simple ĉar ne eblos misatenti aŭ preterpasi tiom neordinaran grupon da vizitantoj en via urbo. Tio EGE helpas nian varbadon ekster la ĉiamaj rondetoj de E°-ŝatantoj. Mi respondos kiel eble plej rapide kaj precize al tiuj, kiuj deziras pli da informoj aŭ praktikajn detalojn. Ankaŭ tion vi povas peti de la pola responsulino, Malgorzata Komarnicka informado.eo@gmail.com Esperante ;-), ke ankaŭ vin konvinkos tiu alloga programo, amike salutas vin Alain Runel (Espéranto-Lozère)
PS Mi pardonpetas de tiuj, kiuj jam ricevis rekte per sia persona @dreso tiun informon. Ili ja ne

bezonas legi tion sed por pli larĝe disvastigi la projekton, mi ĵus aliĝis al tiu diskutlisto, kies anojn mi ne konas...

▪ Bruno Flochon – Esperanto Strasbourg

Esperanto-Strasburgo plezure invitas vin en majo 2019 (de la 10 ĝis la 12a por renkontiĝo en Strasburgo, la Printempo de Esperanto 2019. Venu sperti agrablan etoson, esplorado de la urbo kaj multaj diversaj programeroj inter kiuj kursoj, prelegoj, koncertoj, ludoj, etc.

Ĉiuj informoj en la ĉi-kuna aliĝilo.

Ĝis baldaŭ en Strasburgo !

▪ Jannick Huet-Schumann - Grésillon

Ni havas la plezuron sendi al vi la **"Anĝevan Leteron" de decembro 2018.**

Se vi deziras la franclingvan version, ĝin vi povas trovi sur la jena paĝo : <http://www.esperanto-angers.fr/spip/spip.php?article87>

Agrablan legadon ! Esperanto-Angers www.esperanto-angers.fr

▪ Jannick Huet-Schumann - Grésillon

Les inscriptions pour notre stage intensif d'espéranto PRINTEMPaS ont commencé sur gresillon.org/printemps. Nous retrouverons les talentueux enseignants que sont Pšemek, Christophe et Marion. De plus, le temps sera certainement agréable puisque le stage se déroulera fin avril-début mai !

J'ai envoyé un courrier (postal) aux enseignants d'Espéranto en France (dont j'ai l'adresse!) proposant un bon d'achat de 30€ dans notre "libro-servo" (gresillon.org/libroservo) pour l'inscription de 2 élèves à PRINTEMPaS cette année.

Si votre enseignant n'a pas reçu cette lettre, alors demandez lui de me communiquer son adresse POSTALE.

Pensez à vous inscrire dès maintenant pour être sûr que la chambre souhaitée soit disponible! Olivier Buisson encadrera un groupe international de randonneurs espérantistes pendant notre stage. Votre conjoint ne désirant pas suivre de cours pourrait donc vous accompagner pour profiter de cette activité en parallèle du stage PRINTEMPaS. [Voir cette page](#).

Je me réjouis d'avance de partager cette semaine avec vous et attends vos inscriptions sur gresillon.org/inscription

▪ Gilles Tabard– Esperanto Limousin

Baldaŭ komencos la konkurso 2019 de Poésie en liberté-Poezio tut'libera, duafoje malfermata al poemoj en esperanto.

En 2018, 48 junuloj el la tuta mondo partoprenis la konkurson esperantlingve. La konkurso 2018 finiĝis kun 2 belaj vesperoj en Parizo la 22-an kaj 23-an de novembro.

Ĉi-sube, vi povas vidi (dum la ceremonio de la 22-a de novembro) :

maldekstre : Eva Pechova ricevas la 3-an premion el manoj de Petr Dulak, Ambasadoro de ĉeĥio en Francio

dekstre : Ingrid Berglund ricevas la 1-an premion el manoj de Didier Loison, vic-prezidanto de Esperanto-France

(pliaj fotoj videblaj ĉe www.poesie-en-liberte.fr)

Jen la afiŝo (franclingve) kaj la regularo (esperantlingve) por la konkurso 2019. Mi tre ŝatus ke vi helpu konigi ilin.

Gilles Tabard Komitatano de Espéranto-France Vic-prezidanto de Poésie en liberté

▪ Hori Jasuo - Japon

La libro “Cxiutaga Vivo tra la mondo” aperis hodiaŭ.

Antaŭ pli ol 10 jaroj mi jam eldonis la librojn “Monatoj tra la mondo” kaj “La vivo tra la mondo” el eseoj el diversaj landoj. Poste mi kolektis eseojn pri ĉiutaga vivo tra la mondo, sed poste okazis la UK en Japanio, mia estraranigo de UEA kaj poste la Japana Katastrofo, tial mi ne havis tempon por redakti ilin.

Lastan jaroj japanino s-ino Arase laboris por mi por redakti eseojn, kaj fine mi povis redakti la libron. La libro konsistas el eseoj de 23 esperantistoj el Vjetnamio, Rusio, Belgio, Finnlando, Germanio, Francio, Serbio, Ĉinio, Brazilo, Kroatio, Koreio, Japanio, Togolando, Hungario, Mongolio, Tajlando, Turkio, Nepalo, Burundo, Irano.

La temoj estas jenaj:

1. Mang^aj^oj 2. Vestaj^oj, 3 Domoj 4. Dorlotbestoj 5. Sporto 6. Lingvoj 7. Sanigaj terapioj 8. Hobioj 9. Malnovaj raklontoj 10. Festoj 11. religioj 12. Konstitucio pri milito kaj paco 13. Proverboj

La libro havas 240 pag^ojn en B5-formato. La prezo estas 12 eu^roj. Nur per Esperanto oni povas kolekti tiujn eseojn el diversaj landoj. Nur esperantistoj povas g^ui la libron. Poste mi sendos la libron al Libro servo de UEA, sed por tio oni bezonas multajn tagojn. Vi povos mendi rekte de mi. Vi povos pagi al mia UEA-konto.

HORI Jasuo (s-ro) 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3
<horizonto@water.sannet.ne.jp>

▪ Didier Janot

UNESKO-Kurieron eldonas UNESKO kun financa subteno de Ĉinio.

Pri la versio en Esperanto zorgas teamo de volontulaj tradukantoj. Ankaŭ vi povas helpi por traduki artikolojn al Esperanto, ĉefe el la angla, iom el la franca, kaj iomete el aliaj oficialaj lingvoj de UNESKO.

Kontaktu la ĉefredakoron de la Esperanta versio, Trezoro Huang Yinbao el Ora Ponto (Ĉinio), kies retadreso, telefonnumeron... vi trovos paĝo 2 de la revuo.

Elŝutu kaj ĝuu la legadon

https://en.unesco.org/sites/default/files/cou_4_18_eo.pdf



▪ ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

estas la monda asocio de instruistoj, kursgvidantoj kaj instruemuloj.

Aliĝo kostas nur dek eŭrojn kun reta abono al Internacia Pedagogia Revuo (IPR), aŭ dudek eŭrojn kun la papera versio de IPR.

Eblas aliĝi por 2019 per la aliĝilo 2018/2019 de Espéranto-France

<https://esperanto-france.org/adherer-a-esperanto-france>

– elektu la linion 10€ por ricevi IPR rete,

– elektu la linion 20€ por ricevi per-poŝte la paperan version de IPR.

Y a t-il sur cette liste ou parmi vos connaissances des membres de l'Association des Professeurs de Langues Vivantes ? Cette association semble bien active.

Elle a un site internet <https://www.aplv-languesmodernes.org/>

régulièrement mis à jour, avec des articles intéressants, et une info-lettre hebdomadaire auquel tout le monde peut s'abonner.

C'est certainement un lieu pertinent pour faire connaître l'espéranto, et trouver des enseignants intéressés par l'espéranto. Mais évidemment, cela ne peut pas venir comme un cheveu sur la soupe. Il faut déjà y être, de préférence avec de bonnes entrées...

▪ Bert Schumann – Grésillion

La Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazas dum UK en rando de Lahti.

IIK atendas infanojn kaj junulojn de ĉiu aĝo.

Vidu retejon: bertosch.free.fr/iik2019

Vidu fotojn de la IIK-ejo: <http://bertosch.free.fr/iik2019/fotoj.htm>

Ni serĉas pli da IIK-kungvidantoj, ekzemple junan skolton, sport-intstruiston, savnaĝiston, iun kiu konas multajn grup-ludojn interne kaj ekstere

Tro junan infanon akompanas gepatro. Gepatroj povas dormi en la IIKejo kaj tage partopreni UK-on.

Si vi (gepatroj) ne iros al UK, sed viaj gefiloj volus veni al IIK, tiam ni provos organizi, ke alia e-isto el via lando akompanos viajn gefilojn al Lahti

Se la dato en julio ne taŭgas, venu aŭguste al infana-familia renkonto en Francio gresillon.org/s4

Bv. respondu al: infana.kongreseto@gmail.com

Bv plusendi al interesatoj

Kore salutas la teamo de IIK 2019

▪ Les Editions pourpenser

"Désobéissance réfléchie"

Dans son livre [En quelques mots, Aline de Pétigny](#) nous dit "Obéir" signifie être contraint, donc ne pas réfléchir. Alors, j'aime le principe de la désobéissance.

J'aime la désobéissance réfléchie.

Les lignes, les frontières, les règles, sont faites pour être remises en question.

Remettre en question quelque chose est sain. Réfléchir, se demander si l'on

accepte ou pas telle ou telle règle est un signe de bonne santé mentale !

Apprendre cela aux enfants et accepter leur désobéissance réfléchie, c'est leur faire un véritable cadeau. "

Partagez-nous !

<https://www.pourpenser.fr/>



▪ Maria Aparecida da Silva - Legio de Bona Volo (LBV) San-Paŭlo, Brazilo

Nuntempe la intereso pri la valorigo de la Virinoj ĉie kreskas. Tiu movado favore al "tiu flanko plej ĉarma de la homaro", laŭ diraĵo de la verkisto Paiva Netto, estas tre bonvena.

Atesto, admiro kaj danko al la Virinoj de la tuta mondo: Jen koncize la prezento de la blogaĵo titolita **Civitaninoj**. Tiu artikolo verkita de Paiva Netto estas disponebla en lia blogo.

Do kara samideano, jen nia alvoko al Vi, por legi ĝin kaj volonte lasi vian komenton en la taŭga skatolo. Tiel ni kune kontribuos por la unuiĝo justa de Virinoj kaj Viroj de la tuta homaro. Nek pli nek malpli!

Vi atingos tiun artikolon ĉe <https://goo.gl/ur9qT1>

El la centra sidejo de Legio de Bona Volo (LBV) en urbo San-Paŭlo, Brazilo.

Kun niaj elkoraj salutoj kaj bondeziroj, fratinece, Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

www.paivanetto.com/eo

Ôis

Renseignements complémentaires : 02 54 27 95 51 ou 06 78 90 92 17